A-PDF Merger DEMO : Purchase from www.A-PDF.com to remove the watermark

STARTO

N-ro 3/2018 (268)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO

Memortabulo omaĝe al F.V. Lorenc
kaj ĝia aŭtoro, restaŭristo kaj skulptisto Zdeněk Myslivec

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto**: cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam. cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligon al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:
2800 186 228/2010
Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Kasisto: Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumbazo, kontado)

Komitatano: Libuše Dvořáková, Zahradní 2/B, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, libuse.dvorakova@esperanto.cz (Esperanto-Muzeo en Svitavy, rilatoj al la urbo Svitavy, muzea kaj ekspozicia grupo)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Komitatano: Miroslav Hruška, Haškova 2, 638 00 Brno, tel. 608 224 993, miroslav.hruska@esperanto.cz (junularo, ĉefredaktoro de la asocia retejo kaj de asociaj retkomunikoj, komputila klerigado, teknika subteno, redaktado)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, tel. 257 712 201, chrdle@kavapech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický, P. Dvořáková

103-a Universala Kongreso tra miaj okuloj

Sabate la 28-an de julio 2018 antaŭtagmeze nia ĉeĥa Esperanta grupo feliĉe surteriĝis en Lisbono. Trairante la aerodroman halon ni vidis eĉ ne unu bonveniganton. Nenia afiŝo de la Kongreso, neniu informa servo, eĉ ne unu verda steleto.

Ĉu ni vere estas en urbo de la 103-a UKo?

Translokiĝo al la kongresejo: granda avantaĝo estas tre proksima stacio de metroo. Sed problemo – kiamaniere aĉeti veturbileton, kiom ĝi kostas, kiamaniere pagi la sumon? Nur danke al niaj perfekte parolantaj grupanoj ni eksciis ĉion, havigis la veturbiletojn kaj povis uzi metroon – poste vere ĉiutage – tiun komfortan subteran veturilon. (Mirigis min ĉiam ne tro multaj vojaĝantoj en metroo).

Jura fakultato – la kongresejo

Sukcese ni trovis la kongresejon, la Juristan Universitaton. Sur ĝi jam estis videbla emblemo de la UKo kaj ankaŭ du flagretantaj flagoj kun signo de 103-a UKo. Jes, ni ektroviĝis sur la ĝusta loko, kien ni celis.

La halo de la lernejo estis jam plenplena de multaj homoj (bedaŭrinde neniu konatulo). Nia akcepto pasis sufiĉe rapide. Ni ricevis ŝtofan mansaketon kun emblemo de la Kongreso. La saketo enhavis diversajn kongresajn materialojn, inter ili ankaŭ necesan „kongresan libron“, ene kun fotoj de estraro de UEA (la plej bela viro estas Emílio Cid, apud vere simpatia Mark Fettes, prezidanto de UEA), plua enhavo de la kongresa libro - informo pri unuopaj kongresejoj (ekzemple koncertoj okazis alie ol la ĉefa konferencejo, ankaŭ la solena inaŭguro de UKo), informo pri Lisbono, vere bunta laŭtaga programo kaj prezentado de unuopaj kongresaj programeroj, nomaro de ĉeestantoj. Laŭ la kongresa libro partoprenis entute 1525 esperantistoj el 73 landoj.

Bone, la unua paŝo, la trovo de la kongresejo, estis sukcesa. Kaj nun – trovado de nia loĝado. Sur la karto estas ĉio klara kaj facila, ne tiel sur la stratoj. Kun peza valizo, dum varmega vetero … tamen amikino Vlasta, kiu bone orientiĝas en karto kaj ankaŭ en realo, sukcese trovis nian pensionon. Malgranda ĉambreto kun 2 litoj, 2 noktoŝranketoj, 1 malgranda seĝeto kaj unu stanga robo-pendigilo. Komuna kuirejo, banejo kaj necesejo en koridoro. Sufiĉa komforto.

Sabate, la tagon de nia alveno, posttagmeze, ni vizitis en kongresejo nian unuan kongresan aranĝon: Movadan foiron. Tio estas oferto de plej diversaj informiloj pri plej diversaj landoj, ur-

boj, Esperanto-aranĝoj ktp. Vera Babelo.

Movada foiro

Poste vespere ni ankoraŭ promenis, trarigardante la belan, puran urbon kun interesaj stratoj, kies domoj estas ornamitaj per kaheloj, kun multaj grandaj statuoj, belaj parkoj, ...

Promeno tra la urbo

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis solena inaŭguro: bonvenaj vortoj de estraro, alparoloj de diversaj homoj, unufraza saluto de 73 reprezentantoj de iliaj 73 landoj. Esperanta himno (por mi tre kortuŝa momento). Solena komenco de la grava okazintaĵo por la Esperantistaro. Vespere „Nacia vespero“ kun prezentado de popoldancoj.

Koncerne la kongresan programon – dum la venontaj tagoj mi kun Vlasta plej ŝate vizitis paroligajn lecionojn (kiamaniere oni instruas la lingvon? – Interese, gaje, bonege!), prelegojn pri Portugalio, koncertojn (en la haloj estis sufiĉe da agrabla aero kaj favora temperaturo).

Placo kun fontano kaj kastelo en la fono

Ni multe piediradis tra la urbo kaj fine de nia restado ni konstatis, ke mi faris ĉirkaŭ 60 kilometrojn kaj Vlasta 80! Ni ne ĉiam iradis kune.

Triumfa arko

Merkrede okazadas ekskursoj. Tiun nian, pli malmultekostan ol de UKo, eminente organizis nia Lenka A. Per aŭtobuso, kun simpatia slovaka ĉiĉeronino, ni vizitis malnovan urbon Sintra, iaman sidlokon de la portugalaj reĝoj, sur alia loko ni alpaŝis eĉ randon de oceano kun ĝiaj malvarmaj, abruptaj ondoj, ni vizitis Cabo da Roca – la plej okcidentan lokon de Eŭropo. Ni havis tagmanĝon – festenon kun antaŭmanĝo, poste rostita viando, frititaj terpomofingroj kaj legoma salato, akvo, biero, vino, kafo, dolĉaĵo (ĉeĥe mňam).

Posttagmeze ni vizitis alian videndan urbon - Cascais. Post promeno tra la urbo ni revenis „hejmen“. En Lisbono ni estis ĉirkaŭ la 18-a horo.

Ĉe la oceano

La ceteraj tagoj jam forkuris ege rapide. Krom aliaj travivaĵoj – mi revidis mian longjaran germanan skribamikinon – vere kortuŝa renkontiĝo …

Vendrede Internacia Arta Vespero – bela, amuza. Sabate antaŭtagmeze Solena Fermo de la Kongreso. Finnaj gesamideanoj invitis la ĉeestantojn por partopreni venontan E kongreson 2019 en Lahti, Finnlando.

Ni aŭdis belegan kantadon de Esperanta Ĥoro, sekvis adiaŭaj vortoj kaj fino, adiaŭo, disiro.

Estus ankoraŭ multe por rakonti, sed por nun mi finas. Pli detale kaj kun lumbildoj mi kaj Vlasta povos rakonti al vi dum la oktobra Esperanto konferenco en Benešov. Venu – sed ne nur por nia rakontado.

Leonarda Chaloupková

Pliajn fotojn en Fotogalerio *Muzeum.esperanto.cz*.

SALUTMESAĜO DE UNESKO

Mi estas feliĉa povi sendi ĉi tiujn subtenajn vortojn al la partoprenantoj de la 103-a UK de UEA.

Vi havas la ŝancon kunveni en tiu belega urbo Lisbono, urbo ligita al vasta historio, kiu konstruiĝis en vojkruciĝo kun diversaj kulturoj, urbo malfermita al la mondo, tutokcidente en la Iberia duoninsulo.

Mi ne dubas, ke tiu elstara kadro sukcesos inspiri al vi fruktodonajn interŝanĝojn.

Kiel vi scias, Unesko subtenas la instruadon de Esperanto ekde multaj jaroj.

Estas fakto, ke nia organizo dividas kun la esperantista movado komunajn valorojn: esperon en konstruado de paca mondo, harmonian kunvivadon inter la popoloj, respekton al kultura diverseco, solidarecon trans la limoj.

La cemento de ĉiuj tiuj valoroj estas la kapablo dialogi, aŭskulti, interkomunikiĝi.

Lingvoj estas la vektoro, kiu ebligas tiun dialogon; ili konsistigas do la esencan ilon por atingi la celojn, kiujn ni devas konkretigi, kaj same por defendo de niaj valoroj.

Ni devas defendi la lingvojn, ĉefe la maloftajn lingvojn, la indiĝenajn lingvojn, pri kiuj ni scias nuntempe, ke ili malaperas en ritmo de unu malapero dufoje monate. Tio estas giganta perdo por la homa heredaĵo. Ni devas plie defendi plurlingvismon en la instruado per adekvataj publikaj politikoj, sed ankaŭ en la virtuala spaco de la Reto, tiel ke plu vivu la lingva kaj kultura diverseco en ĉiuj homgrupoj. Gravas, ke ĉiu sukcesu esti en kontakto kun sia historio, sia identeco kaj la simbolaj resursoj de sia origina etno.

Tiu agado de Unesko ankaŭ estas VIA agado. Ĉar Esperanto ne volas forviŝi la grandan kvanton da parolataj lingvoj en la mondo; male ĝi reprezentas taŭgan ilon por komuniki en respekto de ĉiuj lingvoj, ĉu minoritataj, ĉu de la plimulto. Ĝi ebligas ekziston de homgrupo de parolantoj sendependaj de iu ekonomia, politika aŭ kultura hegemonio.

Paroli Esperanton estas alten iri kaj atingi kosmopolitikan konscinivelon, esti mondcivitano sen forlasi siajn apartajn ligojn.

Via elektita temo por via kongreso en tiu ĉi jaro estas: "Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?"

La elektenda direkto certe estas tiu, kiun via movado kaj nia organizo montras de jaroj: engaĝiĝi pli kaj pli por savi kaj vivteni tiun esencan parton de la nemateria homara heredaĵo: la lingvojn. Defendi la lingvan diversecon kaj kuraĝigi al plurlingva edukado.

Tiel ni sukcesos konstrui mondon pli malfermitan, pli inkluzivan kaj pacan. "Multaj voĉoj, unu mondo" jen la slogano de nia fame konata organo Unesko-Kuriero.

"Multaj voĉoj, unu mondo", tiel tradukiĝas al Esperanto tiu idealo, kiun vi kaj ni havas kaj kiu staras sur la versio de nia revuo, kiu nun aperas en Esperanto: Unesko-Kuriero.

Finfine mi volas transdoni, nome de Unesko, elkorajn bondezirojn pri la sukceso de via Kongreso.

Audrey Azoulay,
ĝenerala Direktorino
de Unesko

PREMIOJ DE FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI

La Fondaĵo Antoni Grabowski (FAG) estis kreita sur la bazo de grandanima donaco de Adam Goralski (1912−2005). *La unua premio* (750 us. dolaroj) iras al **Sten Johansson** (Svedio) pro elstara kontribuado al la literaturo de Esperanto. *La duan premion* (400 us. dolaroj) ricevas **Gonçalo Neves** (Portugalio) kaj **Bernhard Pabst** (Germanio) pro sia komune kompilita *Historia vortaro de Esperanto 1887−1889*.

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2018

BRANĈO POEZIO: *Honoraj mencioj* al **Aleksandro Mitin** el Rusio pro "Neĝo", al **Piero Lupo** el Italio pro "Suito", al **Nicola Ruggiero** el Italio pro "Via silento". La premioj ne aljuĝitaj.

BRANĈO PROZO: *Tria premio* al **Ewa Grochowska** el Francio, pro "Nesto de fenikso". *Dua premio* al **Paulo Sérgio Viana** el Brazilo pro "Paperfolio". *Unua premio* al **Laure Patas d'Illiers** el Francio pro "Fermita pro aflikto".

SUBBRANĈO MIKRONOVELO: *Unua premio* al **Laure Patas d'Illiers**, Francio, pro "Homlupo". *Honoraj "senpremiaj" mencioj*: al **Tatjana Auderskaja** el Ukrainio pro "La bela rozo", al **Gonçalo Neves** el Portugalio pro "En Lisbono", al **Paulo Sérgio Viana** el Brazilo pro "Magia penso", al **Ewa Grochowska** el Francio pro "Postkuro".

BRANĈO TEATRAĴO: *Tria premio* al **José Eduardo Rosa Crispim** el Portugalio pro "Pantografo". Dua kaj Unua premioj ne aljuĝitaj.

SUBBRANĈO MONOLOGO KAJ SKEĈO: *Unua premio* al **Laure Patas d'Illiers** el Francio, pro "Servi vin". *Honoraj "senpremiaj" mencioj:* al **Laure Patas d'Illiers** el Francio, pro Bonvenon, al **Valentin Melnikov** el Rusio, pro "Ne juĝu".

BRANĈO ESEO: *Honora mencio* al **Amri Wandel** el Israelo, pro "La homo kiu komprenis la universan lingvon". *Honora mencio* al **Zdravko Seleš** el Kroatio, pro "La rolo de Esperanto en la obskura 20a jarcento". Tria kaj dua premioj ne aljuĝitaj. *Unua premio* – premio Luigi Minnaja – al **Gonçalo Neves** el Portugalio pro "En la mondon venis parol' nova".

INFANLIBRO DE LA JARO:
La premion gajnis, en egaleco la eldonejo Esperanto Asocio de San-Paulo el Brazilo, pro "**La malbeno de Tarumo kaj Nurana**" Kaj la eldonejo Dokumenta Esperanto-Centro el Kroatio pro "**Tikiriki Tok el Strobilo**".

Nova libro de Max Kašparů

Pri cerboj kaj sencerbuloj. Viro, kiu lunde verkas artikolojn, marde vizitas malliberejojn, merkrede laboras en Ĉeĥa Televido, ĵaŭde instruas Esperanton, vendrede ordinas en sia „salona hipnotejo“, sabate prelegas en altlernejo kaj dimanĉe predikas en preĝejo, vidas la vivon el diversaj anguloj (*vortoj el la kovrilo*).

DU NOVAJ MEMBROJ DE LA HONORA PATRONA KOMITATO

La Honora Patrona Komitato de UEA ekhavis du novajn membrojn: **Vytenis Andriukaitis** (*1951, litova medicinisto kaj politikisto) kaj **Judit Polgár** (*1976, hungara ŝakĉampionino). Tiu honora organo konsistas el lingvistoj, sciencistoj kaj aliaj eminentuloj, kiuj faris gravajn servojn al la Esperanto-Movado kaj mem parolas kaj verkis en la Internacia Lingvo. Pri la elekto de Andriukaitis kaj Polgár decidis la Komitato de UEA en sia kunsido en Lisbono.

TRI NOVAJ HONORAJ MEMBROJ DE UEA

En la 103-a Universala Kongreso en Lisbono UEA ricevis tri novajn Honorajn Membrojn. Pro iliaj gravaj servoj al la tutmonda Esperanto-movado la Komitato de UEA distingis s-inon **María Rafaela Urueña Alvarez** (*1942) kaj s-ron **Josep Franquesa i Solé** (*1937), el Hispanio, kaj s-ron **NAN Youli** (*1942), el Ĉinio.

14 ELSTARAJ AGANTOJ DIPLOMITAJ

Diplomo pri Elstara Agado:

José Antonio del Barrio (Hispanio), **Ranieri Clerici** (Italio), **Maritza Gutiérrez González** (Kubo), **François Lo Jacomo** (Francio), **Sun Minghiao "Semio"** (Ĉinio), **Mónika Molnár** (Hungario), **Masako Tahira** (Japanio), **Zlatko Tiŝljar** (Kroatio / Slovenio).

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Cristina Casella (Italio), **István Ertl** (Hungario/Luksemburgo), **Fabrice Morandeau "FaMo"** (Francio), **La Perdita Generacio** (Svedio), **Cyrille Poullet "Platano"** (Francio), **Martin Wiese** (Svedio).

REZOLUCIO DE LA 103-A UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

La 103-a Universala Kongreso de Esperanto, kunveninte en Lisbono de la 28-a de julio ĝis la 4-a de aŭgusto 2018, kun 1567 partoprenintoj el 73 landoj,

konfirmas la grandan aktualecon de la kongresa temo "Kulturo, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?", kiu estis traktita tra la semajno en kvar diversaj sesioj kun abunda partopreno;

notas la koincidon de ĉi tiuj diskutoj kun la 100-a datreveno de la fino de la Unua Mondmilito, kiu markis turnopunkton en la tutmondiĝa procezo;

substrekas, ke la radikoj de la nuna kultura kaj lingva diskriminacio kaj soci-ekonomia sufero, spertataj de granda parto de la homaro, troviĝas en la longa historio de koloniado eŭropa kaj de aliaj landoj pasinta kaj nuntempa, kaj ke solvoj postulas la malkonstruadon de koloniecaj mondrigardoj kaj potencdividoj;

atentigas, ke la neŭtrale homa lingvo Esperanto estas potenca rimedo por mensa malkoloniado, ebliganta reciprokan interkonatiĝon kaj kompreniĝon ekster la kutimaj kadroj de privilegio kaj ekskludado;

pledas por urĝa atento al la defiaj problemoj de lingva, kultura kaj alispeca diskriminacio, sufero kaj mortigo, kunligitaj kun la detruado de la naturo kaj aliaj perfortaj tendencoj de la tutmondiĝo;

deklaras la pretecon de la parolantoj de Esperanto kunlabori en agadoj por helpi kaj protekti homojn kaj popolojn kontraŭ tia perfortado kaj kontribui al la procedo de mensa malkoloniado en ĉiuj landoj de la mondo,

kaj **alvokas** la aktivulojn por Esperanto al praktika solidareca agado kun la suferantoj inkluzive de migrantoj kaj rifuĝintoj laŭ la plej noblaj tradicioj de nia movado.

Nova TEJO-estraro

En la 74-a IJK en la hispana Badajoz la 10-an de aŭgusto 2018 estis elektita nova estraro, en ĝi ankaŭ **Léon Kamenický**, komitatano de Ĉeĥa Esperanto-Junularo (kvankam slovako), kiu al ni prelegis en la pasintjara konferenco en Kroměříž.

La prezidanto estas vjetnama knabino **Hoan Tran**, nomata Ĝojo, la unua vicprezidanto estas la jam menciita **Léon Kamenický**, dua vicprezidanto **Francesco Maurelli** el Usono, ĝenerala sekretario **Konstanze Schönfeld**, kasisto vjetnama junulino **Mung Bui** (Feliĉa), estraranoj **Hans Becklin** (Usono), **Arturo Crespo** (Kolombio), **Kingslim Edah** (Benino) kaj **Olga Sevcenco** (Moldavio).

Ĉiu landa sekcio havas sian komitatanon A, Ĉeĥion reprezentas **Vít Guigliemo Mišurec**.

Kiel enmovadigi Duolingo-lernantojn

Pli ol 1,7 milonoj da homoj eklernis Esperanton per kursoj de Duolingo (kvankam aktuale studas 386 000 homoj kurson por angloj, 303 000 por hispanoj kaj 37 100 por portugaloj). Sed minacas danĝero, ke post fino de la kurso ili denove malaperos, se ili ne trovos interesan aplikon de Esperanto en nia komunumo. Tial UEA fariĝis partnero de Duolingo kaj esperantigas evento-retejon de Duolingo. Evento-gastigantoj estas volontuloj, kiuj organizas interesajn babiladojn, studgrupojn, ludajn kaj muzikajn renkontiĝojn en loka klubo aŭ kafejo, promenadojn tra urbo aŭ tra naturo ktp.

Kleriga literaturo

Pri graveco de kleriga literaturo en Esperanto por kapti intereson de la publiko ni parolis en Starto 1/2018, p. 14.

En la eldonejo KAVA-PECH estas je via dispono pluraj klerigaj libroj: **Terminologiaj konsideroj** de Jan Werner, **La afrika medicino, mirige efika** de Yvette Parès, **Matematika vortaro kaj oklingva leksikono** de Marc Bavant, **Terminaro de feloj** de Lubomír Středa k.a. Vidu https://www.kava-pech.cz/#/cz/t/eo/special

Esperantistoj kunvenis sub Kuňka, kelkajn atendas Lisbono

Sub tiu titolo aperis ĉeĥlingva artikolo en la 24-a numero de gazeto Pardubický týden (Pardubica semajno) pri esperantista renkontiĝo sub la monto Kunětická, familiare Kuňka, kiun organizis la Klubo de Stanislav Schulhof Pardubice kiel sian 20-an Esperanto-Tagon.

Esperantisté se sešli pod „Kuňkou", některé čeká i Lisabon

Pardubice – Po dvacáté pořádá pardubický Klub esperantistů doktora Schulhofa všechny vyznavače a uživatele tohoto mezinárodního jazyka k setkání v rámci 20. Esperantského dne. Pod Kunětickou horu přijelo 56 esperantistů ze všech koutů Česka včetně dvou Maďarů z Francie.

„Setkání bylo ovlivněno zpěvem esperantských i českých písniček i recitací esperantské poezie. Všem se dostalo informací o činnosti Esperantského muzea ve Svitavách a proběhlo i nové vydanou esperantskou literaturu. Veškerá jednání probíhala v esperantu.

„V dnešní době již nepořádáme kurzy jako dřív přímo ve třídě, ale buď zájemcům doporučíme webové stránky, kde je několik kurzů nejen českých, ale třeba od autorů z Brazílie nebo ze Slovenska. Těm, co se raději učí v kolektivu, doporučujeme seminář na jaře a na podzim v Českém ráji v obci Skokovy, kde za necelý týden udělají velký pokrok," přiblížila Lenka Angelová, předsedkyně Svazu zdravotně postižených esperantistů. Ještě před pěti až deseti lety to vypadalo, že mladí lidi nemají o esperanto zájem. „Ale překvapil nás, že si členové naší svůj kolektiv a učí se většinou na internetových kurzech, komunikují na Facebooku nebo na jiných sítích," dodala Lenka Angelová, která v současné době připravuje zájezd do portugalského Lisabonu na 103. světový kongres esperantistů v červenci tohoto roku. Už je na něj přihlášeno 1500 esperantistů z 65 zemí světa a z ČR se zúčastní přibližně 30 osob.

Svaz zdravotně postižených esperantistů má v Pardubicích na třídě Míru vyvěšení skříňku, kterou členové aktualizují každé tři měsíce. Tam naleznete kontakty na klub. (pad)

Esperanto je nejrozšířenějším mezinárodním plánovým jazykem. Nazvy je odvozen ze pseudonymu, pod nímž roku 1887 Ludvik Lazar Zamenhof základy řeči publikoval. Záměrem tvůrce bylo vytvořit snadno naučitelný jazyk, vhodný pro použití v mezinárodní komunikaci.

Memortabulo en Vrdy senvualigita

La 8an de julio okazis grava evento en la komunumo Vrdy, al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de Francisko Valdomiro Lorenz (la nomo de František Vladimír Lorenc post ĝia portugaligo). La loka biblioteko portas ekde la unua de julio oficialan nomon "Knihovna Františka Vladimíra Lorence Vrdy" (Biblioteko Francisko Valdomiro Lorenz Vrdy) kaj dimanĉe la 8an de julio okazis senvualigo de la memortabulo pri F. V. Lorenz (sur ĝia ekstera muro), produktita fare de la restaŭristo, skulptisto kaj esperantisto Zdeněk Myslivec.

En la unua vico la honoraj gastoj

La publiko konsistis el proksimume 100 personoj. El Brazilo venis saluti la ĉeestantojn la ĉeĥa ĝenerala konsulo el Sao Paŭlo, s-ino Pavla Havrlíková. Post la enkondukaj vortoj de la urbestro de Vrdy Antonín Šindelář, la bibliotekistino Pavla Kobelová prezentis honorajn gastojn kaj skizis la programon de la posttagmezo. Sekvis prelego de Petro Chrdle pri la vivo kaj verko de F. V. Lorenc kun legitaj fragmentoj el la libro pri Lorenc (estis citaĵoj de Lorenc mem el la letero al fratino, lia amiko, kaj s-ino Novinski, eksa estro el la Muzeo de enmigrintoj en Dom Feliciano), Pavla Dvořáková prezentis sian murekspozicion pri F. V. Lorenc. Ĝi restos en la koridoro de la biblioteko.

Post salutvortoj de sinjorino Havrlíková, prezidantinoj de Ĉeĥa Esperanto-Asocio Libuše Hýblová (legis Leonka Chaloupková) kaj Asocio de handikapitaj esperantistoj Lenka Angelová, oni menciis skribajn salutojn (inter ili ankaŭ tiun de la pranepo de F. V. Lorenc kaj la ĉeĥa honora konsulo en Porto Alegre, Fernando Lorenz de Azevedo). Ĉiuj salutmesaĝoj, kun la tradukoj, estis en tablo por rigardi, kaj ili restos konsulteblaj en la biblioteko.

Sekvis la propra senvualigo de la memortabulo fare de la konsulino Havrlíková kaj urbestro Šindelář, tosto kaj refreŝiĝo, dume en prelegĉambro estis ripete projekciita 14-minuta brazila filmo pri Lorenz, ĉeĥe dublita fare de Vladimír Türk kaj lia filino, kaj oni povis ankaŭ konatiĝi kun la libroj de la eldonejo KAVA-PECH. Plej granda intereso estis kompreneble pri la libro de

Vlastimil Novobilský *František Vladimír Lorenc, atesto pri la vivo de eksterordinara homo*, ne nur pri la ĉeĥa versio, sed vendiĝis eĉ kelkaj en Esperanto. Bedaŭrinde ĝia aŭtoro ne povis ĉeesti pro serioza malsano.

La preĝejo en Zbyslav

Post la priskribita riĉa programo oni busveturigis la partoprenantojn al la proksima naskiĝvilaĝo de Lorenz, Zbyslav, kie oni vizitis la lokan preĝejon, en kiu estis Lorenz baptita, la iaman lernejon, kie li komencis edukiĝi kaj deekstere ankaŭ lian naskiĝdomon. La domo ankoraŭ staras, estas en privata posedaĵo, bedaŭrinde ne plu loĝata kaj en preskaŭ katastrofa stato.

Naskiĝdomo de F. V. Lorenc

La partoprenantoj en Čáslav

Multaj esperantistoj ĉeestontaj la eventon en Vrdy renkontiĝis jam antaŭtagmeze en Čáslav, kie ili sub la gvido de Pavla Dvořáková konatiĝis kun la gimnazio, kiun vizitadis juna Lorenc, (apud la muzeo), sinagogo konstruita en maŭra stilo, teatro, preĝejo, memorsalono pri Jan Žižka, Otakar-turo kaj bone konservita mezepoka murego; kaj post komuna tagmanĝo ili estis veturigitaj per la aŭtobuso disponigita de la komunumo Vrdy al la tiea biblioteko por partopreni la supre priskribitan festenon.

Petr Chrdle

La 22-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Poděbrady

La temo de la Kongreso, kiu estis samtempe la 70-a kongreso de IKUE kaj la 68-a kongreso de KELI, estis „Akvo“. Ne nur pro varma, senpluva vetero, de kiu suferas multe da landoj, sed pro urĝa neceso refreŝigi soifajn animojn. Tiel la Kongreso, kiu inter la 6-13 de aŭgusto 2018 okazis en Agrikultura Mezlernejo en Poděbrady, bone korespondis kun la antaŭa 21-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Strasburgo (2015), kies temo estis „Donu al mi trinki“ (Johano 4,7).

Danke al oferema zorgo de fratoj Pavel kaj Tomáš Polnický, sinjorino Jindřiška Dubinová kaj laborantoj de la mezlernejo ĉio estis bonege organizita. Pri bona etoso zorgis prezidanto de KELI Philippe Cousson, pastro Serhij Prudko, pastoro Pavel Klimeš kaj muzikistoj Ernst Leuze kaj Agneta Järlström.

Sume 76 partoprenantoj el 13 eŭropaj landoj (AT, CZ, DE, EE, FR, HR, HU, IT, PL, RO, SE, SK, UA) kaj Japanio travivis agrablan semajnon en fama bohemia banloka urbo Poděbrady. Tiel la Kongreso helpis al kontaktoj de kredantoj de Eŭropo kaj Azio. Ĉeĥa Respubliko estis reprezentata de Alžběta Citavá, Bronislava Cvrčková, Jindřiška Dubinová, Petr Chrdle, Pavel Klimeš, Alois Klumpar, Marie Klumparová, Jan Kovář, Pavel Polnický, Tomáš Polnický, Jan Pospíšil, Václav Pospíšil, Jiří Studený, Miloslav Šváček, Marie Žížalová kaj aŭtoro de la artikolo.

Direktorino de la Agrikultura Mezlernejo Milena Kavková, urbestro de Poděbrady Ladislav Langr kaj predikanto de la Eklezio Frata Pavel Paluchník, kiuj estis gastoj de solena inaŭguro, estis plezure surprizitaj de plenvoĉe kantata himno „La Espero“.

Post matenaj preĝoj, matenmanĝo kaj komuna kantado sekvadis prelegoj pri ekumenismo, Francisko Valdomiro Lorenc, unuiĝintaj eklezioj, papo Francisko, Biblio de Kralice, apostoloj kaj iliaj atributoj, la 100-jara datreveno de Ĉeĥo-

frata Evangelia Eklezio kaj pri Estonio.

Okazis jarkunvenoj de IKUE kaj KELI kaj ankaŭ de kristana sekcio de ĈEA. Novaj libroj pri religio, diversaj temoj kaj insektoj estis prezentitaj.

Dum ekskursoj la partoprenantoj konatiĝis kun Poděbrady, Kutná Hora, Kolín, Chlumec nad Cidlinou, Kladruby nad Labem, Přerov nad Labem kaj Rožďalovice. La kongresanoj partoprenis en mesoj kaj diservoj en Poděbrady, Kolín kaj Lysá nad Labem.

Valoraj koncertoj de Richard Haan, solisto de Nacia Teatro, kaj Jolana Haan Smyčková, kantistino de Teatro Semafor en Prago, kaj loka gea Ĥoro de Sankta Cecilio estis varme akceptitaj kaj bonege aplaŭditaj.

Partoprenantoj de la Kongreso forveturis vere refreŝigitaj kaj plenaj de elano kaj kun multaj novaj travivaĵoj.

Oldřich Arnošt Fischer
(teksto kaj fotoj)

Babilado kun kafumado

La 11-an de septembro 2018 la Paroĥo de Evangelia Eklezio en Svitavy invitis gastojn en sian „Kafejon“. Post enkonduka diservo kun J. Bodeček ricevis la vorton prezidantino de Klubo de Esperanto-amikoj en Svitavy Ing. Libuše Dvořáková kun prelego pri „Esperanto en Svitavy kaj en la mondo“.

Enkonduke ŝi konatigis la aŭskultantojn kun Esperanto kiel lingvo, kun ĝiaj organizaĵoj kaj aranĝoj. Poste ŝi dediĉis sin al historio de la esperantista klubo en Svitavy. La klubo ĉi-jare atingis sian 85-jariĝon.

La prezentado vekis grandan intereson, kelkaj aŭskultantoj rekonis en fotoj siajn konatojn. Inter la ĉeestantoj estis sinjoro, kiu vizitadis Esperanto-kurson de Linhart Rýznar jam en la jaroj 1946 kaj 1947. Dum kafumado disvolviĝis vigla diskutado, kiu pruvas, ke la homoj interesiĝas pri esperantista agado en la urbo kaj ke ili sekvas la aranĝojn.

Miroslav Sýkora

Eksterlandaj amikoj denove ĝojigis nin

En la tagoj 4.-9.8.2018 la Esperantista klubo en Svitavy festis 85 jarojn de sia ekzisto. La aranĝo okazis sub aŭspicio de la urbestro de Svitavy magistro David Šimek.

Ni invitis ankaŭ niajn eksterlandajn geamikojn. El Ĉinio alveturis redaktorino de Ĉina Radio Internacia Zhang Ping, nomata Ĝoja, kun siaj gepatroj kaj montris al ili ne nur Svitavy, sed ankaŭ Pragon, Litomyšl, Olomouc, Nový Jičín.

Kadre de la soleno Ĝoja transdonis al la reprezentanto de la urbo – estro de la fako por edukado kaj kulturo, magistro Jiří Petr – diplomon „Urbo de teo“, libron Rakonto pri teo, kun mencio pri Svitavy kaj loka Esperanto-klubo, kaj plurajn etajn donacojn.

Venis ankaŭ gastoj el Aŭstrio, Germanio, Hungario kaj Ruslando. Interese estas, ke filo de nia gasto Hans Karl Schaeffer instruas en germana mezlernejo, ĝemela kun gimnazio de Svitavy.

Dimanĉe vespere efektiviĝis koncerto de profesia kantistino el Budapeŝto Anna Bartek - Anjo Amika. Ankaŭ ĉi tiu koncerto estis rekte elsendita same kiel aliaj partoj de la renkonto per Verda Stacio tra YouTube kaj Facebook en la tutan mondon. Al rekta elsendo reagis per alparolo Pavol Petrik el Slovakio. Anjo dediĉis unu kanton al Marcus Beyer el Germanio, kiu partoprenis la renkonton pasintjare kaj antaŭ nelonge forlasis nin por eterne. La rememoro estis kortuŝa, sed ege trista.

Profesia rusa aktorino Jana Muĵetskaja el Petrogrado deklamis esperantlingve poemon Patrino de Otakar Březina.

Lunde ni vizitis grotan abismon Macocha en Moravia karsto kaj boatis sur subtera rivereto Punkva. De Macocha ni veturis rekte al la kastelo en Bartošovice, nia Esperanto-lernejo. Antaŭtagmeze instruado, posttagmeze ekskursoj. Merkrede ripetiĝis simila programo kiel en Svitavy.

En la Urba Biblioteko de Nový Jičín Ĝoja transdonis al la urba reprezentanto – vicurbestro Pavel Rozbroj – diplomon „Urbo de teo“, libron „Rakonto pri teo“ kaj aliajn donacojn. Sekvis ceremonio de teo, kiun montris Ĝoja, kaj la programo daŭris per solena inaŭguro de ekspozicio pri Filmfestivalo „Amo kaj teo“ en Ĉinio.

Plejparto de la programo denove iris tra YouTube rekte en la mondon. Sekvis ĝin esperantistoj el 17 landoj, plej multaj sekvantoj el Svislando, tamen troviĝis aŭskultantoj ankaŭ en Nov-Zelando kaj Sudafrika Respubliko.

Tiel riĉan programon kun eksterlanda partopreno ni povis permesi al ni danke al subvencio de la urbo Svitavy.

Libuše Dvořáková

Teo Amo interreta butiko

http://www.teoamo.cz/

En la reta butiko de TEO AMO vi trovos teon Zamenhof, plie teojn Pu'er, jasmenan, verdan, nigran kaj blankan, ĉiujn el Ĉinio.

RECENZO

Jiří S. Kupka: **Sangofragoj. Rakonto de virino, kiu transvivis gulagon**, tradukis Jan Werner, eldonis ERGO Brauner, Dolní Kounice 2018, distribuas Kartuziánské nakladatelství, Brno, jirkabrauner@gmail.com, prezo 260 Kč / 10 eŭro). Kovrilon kreis Léna Brauner.

En 1945 Ruĝa Armeo liberigis Ĉeĥoslovakion, sed samtempe arestis rusojn, kiuj antaŭ jaroj forkuris el Sovetio kaj tiamaniere

perfidis socialismon kaj laboristan klason. Věra Sosnarová havis 14 jarojn, kiam ŝi kaj ŝia 9-jara fratineto Naďa estis arestitaj kune kun ilia patrino, rusino, kiu foriris el Sovetio kun ĉeĥaj legianoj batalantaj kontraŭ Lenin. Kiel perfidulino ŝi estis kaptita eĉ kun la infanoj, transportita al buĉejo, kie jam estis kolektitaj multaj aliaj samsortanoj. Ili vane atendis helpon de la loĝantaro, kiu opiniis ilin germanoj kaj malice deziris al ili ilian malfeliĉon.

Ili ne estis buĉitaj, sed pelitaj al Mikulov kaj per brutvagonaroj transportitaj al Siberia gulago. Post 19 jaroj Věra revenis al Ĉeĥoslovakio, sed ŝi devis subskribi deklaron, ke ŝi ĉion prisilentos. Eĉ ŝia edzo nenion suspektis.

Nur post 1990 ŝi ekparolis. Verkisto Jiří S. Kupka prilaboris ŝiajn travivaĵojn en libro *Krvavé jahody*. La libro en Ĉeĥio furoras, s-ino Sosnarová estas invitata al debatoj, kie ŝi rakontas teruraĵojn, kiujn ŝi travivis.

Nun aperas ankaŭ esperantlingva traduko sub titolo **Sangofragoj**. La tradukisto uzis klaran klasikan Esperanton, esperantigis nur la personajn nomojn (Vera, Nadja, Marja, Motja k.s.). Leganton ne atendas lingvaj malfacilaĵoj, sed priskribo de infero en la gulaga vivo.

Miroslav Malovec

KONFERENCE ČES V BENEŠOVĚ 12. - 14.10.2018

Možnost přihlášení:
elektronická přihláška na http://esperanto.cz/aligxhilo2018 (výhodně do 15.9.2018)
papírová přihláška časopis STARTO 2/2018 (výhodně do 15.9.2018)

PROGRAM

PÁTEK 12.10.
Od 16:00 příjezd účastníků (na nádraží ČD v Benešově je mezi 15-18 hod. informační esperantská služba), ubytování účastníků
17:00 -18:00 esperantský konverzační kroužek s Jindřiškou Drahotovou, schůzky zájmových skupin, atelier Origami s mládeží ČES
18:00 - 19:00 večeře
19:00 -20:00 esperantský konverzační kroužek s Mirkou Tomečkovou, schůzky zájmových skupin, atelier Origami

20:00 - 23:50 VZDĚLÁVACÍ A ZÁBAVNÝ PROGRAM (informace o významných událostech v době mezi konferencemi 2017 v Kroměříži a 2018 v Benešově)

- tosto por Zamĉjo 2017, XI., XII. - E-mentál
- esperantská opera Sternenhoch na Nové scéně Národního divadla, IV. 2018
- 20. E setkání v Pardubicích, IV. 2018 – AEH
- odhalení pamětní desky F.V.Lorence ve Vrdech u Čáslavi,krátký film,VII. 2018 - P. Dvořáková
- 103-a Universala Esperanto kongreso, Lisabon, VII./VIII. 2018 – L.Chaloupková a V. Stará
- Internacia ekumena kongreso, Poděbrady, VIII. 2018 – P.Polnický
- oslava 10 let esperantského muzea Svitavy, IX. 2018

společenské hry – česká mládež – ČEJ, zpívání při kytaře, samozřejmě neformální rozhovory účastníků – prefere en esperanto, ne krokodilado!

SOBOTA 13.10.
7:30 - 8:30 snídaně
9:00 - 12:00 ČLENSKÁ SCHŮZE ČES

PROGRAM:

1) ZAHÁJENÍ, přivítání účastníků starostou města v esperantu. Přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatele zápisu) – Mgr. L. Hýblová

2) ZPRÁVA O HOSPODAŘENÍ ČES – Ing. V. Hirš

3) Zpráva o činnosti ČES a jejích organizačních složek - L.Chaloupková
- vystoupení vedoucího delegáta UEA - Dr. Chrdle
- novinky nakladatelství KAVA-PECH - Dr. Chrdle
- zpráva o činnosti esperantských kroužků
- zpráva zástupců sekcí a komisí ČES a samostatných občanských sdružení o jejich činnosti
- představení kandidáta na příští sjezd ČES

PŘESTÁVKA 10:00 - 10:20

4) VOLBA VOLEBNÍ KOMISE pro volby do výboru ČES pro rok 2019
5) DISKUZE ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES
6) RŮZNÉ
7) USNESENÍ
8) ZÁVĚR

12:00 - 14:00 oběd, volný program
14:00 - 18:00 autobusový výlet (od školy = konferenceja) na zámek JEMNIŠTĚ, prohlídka zámku, setkání s majitelem – hrabětem Jiřím Šternberkem
18:00 - 19:00 večeře, volný program, jednání zájmových skupin
20:00 - 23:50 SPOLEČENSKÝ VEČER s hudbou – předtančení, tombola společenské hry (vzhledem k tomu, že ve školní jídelně není k dispozici víno, pivo a jiné alkoholické nápoje, prosíme účastníky, aby se jimi případně zásobili sami)

NEDĚLE 14.10.
7:30 - 8:30 snídaně
9:00 - 12:00 1) výlet (od školy = konferenceja) EKOVLÁČKEM na zámek KONOPIŠTĚ, fakultativní (= nezávazná, nepovinná) prohlídka zámku
JÍZDNÉ autobusem a ekovláčkem je hrazeno z dotace města Benešov, VSTUPNÉ do zámků si platí účastníci sami: zámek Jemniště – vstupné 160 Kč, senioři 130 Kč, zámek Konopiště – vstupné 180 Kč, senioři 130 Kč

nebo 2) procházka městem s průvodcem
nebo 3) volný program a konverzace v E klubovně, cca 800 m od školy
nebo 4) schůzky pracovních skupin

12:00 - 13:00 oběd, rozloučení, odjezd (o časech vlakových spojů účastníky případně informují členové E klubu Benešov)

VOŠ a Střední zeměděl. škola Benešov,
místo konference, hlavní vstup ze dvora školy.

Internát naproti škole - ubytování účastníků
Mendelova 131

PROGRAMO DE LA ĈEA-KONFERENCO EN BENEŠOV
(12.-14.10.2018)

Vendredo 12.10.
ekde la 16-a horo - alveno de la ĉeestantoj, loĝigo
17-18-a horo - paroliga rondeto por komencantoj,
diversaj interesrondetoj
18 - 19-a horo - vespermanĝo
19 - 20-a horo - paroliga rondeto, diversaj interesrondetoj
20 - 24-a horo - serioza kaj distra programo en manĝejo de la lernejo

Sabato 13.10.
8 - 9-a horo - matenmaĝo
9 - 12-a horo - konferenca traktado
12 - 12:30-a horo - tagmanĝo
14 - 18-a horo - aŭtobusa ekskurso al la kastelo Jemniště,
trarigardo de la kastelo, kunveno kun la posedanto
de la kastelo grafo Jiří Šternberk
18 - 19-a horo - vespermanĝo
20 - 24-a horo - societa programo kun muziko kaj danco, tombolo,
societaj ludoj

Dimanĉo 14.10.
8 - 9-a horo - matenmanĝo
9 - 12-a horo - ekskurso per urba ekovagonareto
al la kastelo Konopiště, fakultativa trarigardo de la kastelo
aŭ promeno tra la urbo aŭ amika babilado kaj laŭvola
programo en nia proksima Esperanto-klubo
aŭ event. kunvenoj de laborgrupoj
12 - 13:30-a horo - tagmanĝo, adiaŭo kaj forveturo de la ĉeestantoj
13:49 - forveturo de rapidtrajno al Prago

Tradukistoj de Otokar Březina konataj kaj nekonataj

estas nomo de nova ekspozicio, kiun aranĝis Viktor Dvořák en Jaroměřice nad Rokytnou kaj inaŭguris la 1-an de septembro 2018. Ĝi daŭros ĝis la 31-a de oktobro.



La ekspozicio prezentas ne nur Esperanto-tradukistojn Jiří Kořínek kaj Tomáš Pumpr, sed ankaŭ tiujn, kiuj tradukis la versojn de Březina en la germanan, francan, hungaran, rusan, latinan ktp.

foto de V. Dvořák

Esperanto-klubo "La Ponto"
invitas vin al

AnkRo

Antaŭkristnaska Renkontiĝo
sabate 1.12.2018 en Písek

Ekde 10:00:
Adventa matineo en la Urba Biblioteko Urbopromeno

Posttagmeze:
solenaĵo omaĝe al 110-jariĝo de Esperanto en Písek kaj tradicia programo kun popolaj kaj kristanaj kristnaskaj kutimoj, kantoj kaj tombolo

Kotizo por la programo kaj refreŝiĝo:
100,- CZK

Kontakto kaj aliĝoj (ĝis 27.11.)
Pavla Dvořáková
pavla.dvorakova@esperanto.cz
tel. 774 942424

10 jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy

La 20an de septembro 2008, do antaŭ 10 jaroj, estis solene inaŭgurita Esperanto-Muzeo en Svitavy. Omaĝe al tiu jubileo estis en la tagoj 14. - 16. 9. 2018 en Muzeo preparita solena festo kun akompana programo. Ĝi okazis sub aŭspicio de urbestro de Svitavy, sinjoro David Šimek, kiu partoprenis sabatan solenaĵon kun direktorino de Urba Muzeo kaj Galerio en Svitavy, sinjorino Blanka Čuhelová. Ekde vendredo festis kun ni gastoj el Slovakio, Hungario kaj Francio.

Ni rememorigu, ke la muzeo estiĝis danke al kunlaboro inter la urbo Svitavy, Urba Muzeo kaj Galerio Svitavy, loka Klubo de amikoj de Esperanto kaj Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Ekeston de la muzeo grave finance subtenis Ministerio pri Kulturo de Ĉeĥa Respubliko, la urbo Svitavy, la fondaĵo Esperantic Studies Foundation, ESF (Usono) kaj ĈEA. La belega domo, en kiu la Muzeo situas, estas posedaĵo de la urbo, kiu estas prizorgata de la Urba Muzeo kaj Esperanto-Muzeo estas tie en senpaga luo. Ekde la jaro 2011 estas en ĝi ankaŭ sidejo de ĈEA. La buston de Zamenhof pruntas al ni la Urba Muzeo en Česká Třebová.

Nun iom el la programo. Vendrede estis solene inaŭgurita ekspozicio nomita "10 jaroj de la muzeo kaj 100 jaroj de la respubliko".

La unua parto de la ekspozicio prezentas al ni eksterlandajn gastojn de la muzeo, pasintajn aranĝojn, eksponaĵojn de donacintoj de la Muzeo kaj ankaŭ nian prezentadon de la urbo Svitavy kaj de la Regiono Pardubice pere de Esperanto. La dua parto de la ekspozicio estas dediĉita al historio de E-movado en Ĉeĥoslovakio en la jaroj 1918-1968. Poste kelkaj partoprenantoj (V. Kočvara, P. Polnický, L. Chaloupková) diris al ni siajn rememorojn el tiu tempo kaj Peter Baláž prelegis pri aktivecoj de E@I.

Sabate dum la solenaĵo, okazinta en la granda salono de la Ottendorfer-Domo, ni povis aŭdi salutvortojn de la urbestro de Svitavy, de la direktorino de Urba Muzeo kaj Galerio, de Peter Baláž nome de SKEF, László Szilvási nome de KEA, Lenka Angelová nome de AEH kaj ankaŭ salutvortojn el la mondo (Italio, Aŭstrio, Togo, Nederlando, Rumanio, Pollando, Brazilo, Belgio, Usono). Ni ricevis ankaŭ salutleteron de Blanka Skučková, estrino de la departemento pri bibliotekoj kaj literaturoj en la Ministerio

pri Kulturo. Petr Chrdle konatigis nin kun tempo antaŭ kaj dum ekesto de la Esperanto-Muzeo. Poste samideanino Libuše Dvořáková prezentis al ni dek jarojn en la muzeo rilate al ekesto, aranĝoj, gastoj kaj biblioteko kaj sinjorino Pavla Dvořáková prezentis al ni ekspoziciojn, inaŭgurojn kaj uzon de informaj teknologioj en la muzeo kaj sekve pianludis.

Poste ni revenis suben en la muzeon, kie atendis nin ne nur loka televido, sed ankaŭ torto kun kandeloj. Mi dankis al tiuj, kiuj prizorgas la muzeon, ĉar sen ili, speciale sen loka klubo, ne povus nia muzeo transvivi. Posttagmeze sekvis ekskurso al muzeo kaj kastelo en Moravská Třebová, vespere okazis koncerto de la muzikgrupo NOPROBLEM Kostelec na Hané kaj poste ĉeĥo-slovaka vespero kun amuza programo.

Dimanĉe laŭ la ideo de Viktor Dvořák okazis Muzea seminario, en kiu prelegis Vlastimil Kočvara, Miroslav Malovec, Vladimír Türk, Peter Baláž, Ján Vajs, László Szilvási kaj Mária Piľková. Ĉefaj temoj estis historio de niaj movadoj kaj ciferecigado, prilaborado kaj posta uzo de historiaj materialoj.

La festo okazis ne nur por festi dekjariĝon de la muzeo, sed ankaŭ por danki al ĉiuj, kiuj akiris meriton pri ekesto de Esperanto-Muzeo kaj kiuj ĝin subtenas kaj zorgas pri ĝi. Ni povis aŭdi multajn nomojn, sed certe ni dum tiuj tagoj ne parolis pri ĉiuj, do ankoraŭfoje mi dankas al ĉiuj, kiuj diversmaniere laboras por la muzeo kaj al iliaj familioj, sen kies subteno tio ne eblus.

Libuše Hýblová

fotoj Pavla Dvořáková kaj Ján Vajs

PÍSEK - NETOLICE

Geklubanoj el Písek vizitis Netolice 9.6.2018 kadre de la vakera muzik-festivalo, kiun enkondukis Vladimír Türk kun sia frato kaj prezentis ankaŭ unu kanton de la konata folkgrupo "Nezmaři" en sia traduko al Esperanto. Sekve 30.6. en la ĝardeno de Jan Fidel Řepa okazis la la tradicia kluba aranĝo "Ĝardena festeno" kun frandado, babilado, planado de plua kunlaboro, kantado kaj vizito de la teatra spektaklo en la ĝardeno de la kastelo Kratochvíle.

La aktiveco de la klubo nun koncentriĝas pri historiaj esploroj okaze de la ĉi-jara 110-jara jubileo, kiu estos solenata dum AnkRo 1.12.

LANČOV

Renkontiĝo de eksaj tendaranoj (10-12.8.2018)

OSTRAVA

La klubo Ostrava-Vítkovice okazigis la 18-an de majo 2018 sian tradician frand-aranĝon OVOFRITAĴO, ĉi-foje en Frýdlant.

Unu monaton poste realiĝis la RENKONTIĜO SUR ĈANTORIO, kiu okazas tradicie la trian dimanĉon de junio (regule ekde 1927, escepte de la jaroj de la dua mondmilito). Ĉi-jare partoprenis ĝin entute 19 geesperantistoj - poloj atingis la monto-pinton per telfero, ĉeĥoj perpiede. La renkontiĝo okazis en la la gastejo per amika babilado. Ĉiuj estas bonvenaj sekvajare je la sama tempo. Pliajn informojn petu ĉe

suchanekj@seznam.cz.

70-a kongreso de IFEF, Wroclaw, Pollando

La ĉi-jara kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) okazis jam la 70-an fojon, ĉi foje en la pola Vroclavo, en la tagoj 19.-25.5.2018. El 20 landoj alveturis 118 partoprenantoj, inter ili ankaŭ multnombra grupo de ĉeĥaj fervojistoj-esperantistoj. Apud fakaj prelegoj kun fervojaj temoj estis traktataj ankaŭ organizaj aferoj de IFEF kaj planoj por la venonta periodo. Ĉe kulturaj prezentoj ni povis ekkoni folklorajn grupojn el Malsupra Silezio kaj alveturis ankaŭ grupo Noproblem el Kostelec na Hané.

La polaj esperantistoj preparis por ni ekskursojn al fervoja muze Jaworzyna Şląska kaj al Krkonoše de la pola flanko. La venontan kongreson gastigos la hispana Malaga en majo 2019.

Restadejo Val d'Esquiere – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)
2an - 9an de Marto 2019

INFORMOJ KAJ ALIĜOJ :
Monique Prezioso, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, Francio
prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
Christine Graissaguel, Les Iles d'Or-A, 59 rue du Progrès, FR 83600 Fréjus
kris_grai@hotmail.fr - tel. 0033(0)4 94 95 66 18

55-aj Baltiaj tagoj

6-14 julio 2019

Litova Esperanto-Asocio okaze de sia 100-jariĝo afable invitas vin partopreni la 55-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-55).

BET-55 okazos en la nordlitovia urbo **PANEVĖŽYS**, kiu situas ambaŭflanke de la rivero NEVĖŽIS, 136 kilometrojn nord-okcidenten for de la ĉefurbo de Litovio Vilnius.

Partoprenkotizo por ekssocialismaj landoj estas 35 eŭroj ĝis la 31-a de decembro 2018 aŭ 45 eŭroj post la 1-a de januaro 2019.

Aliĝilon sendu al al Litova Esperanto-Asocio: p.k. 167, LT-44002 Kaunas, Litovio aŭ aliĝu rete: litova.ea@mail.lt
www.esperanto.lt/board/zboard.php?id=BET55

LA 51-a ILEI-KONGRESO EN MADRIDO 20-27.7. 2018

De la 20-a ĝis la 27-a de julio okazis en la hispana ĉefurbo Madrido la 51-a pedagogia kongreso de ILEI al kiu aliĝis 256 gesamideanoj el 33 landoj. Samtempe okazis la 77-a Hispana Kongreso de Esperanto. La aranĝoj okazis en la rezidejoj *Teresa de Jesús* kaj *Diego de Covarrubias*, kie la partoprenantoj loĝis en studentaj ĉambroj. Diversaj salonoj havis nomojn de konataj esperantistoj.

La solena inaŭguro kaj pluraj ILEI programeroj okazis en la fakultato pri humanecaj fakoj en la "Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado" konata sub la nomo UNED. La 26-an de julio tie okazis la Simpozia tago kun interesaj prelegoj, kiujn ĉiuj povis ĉeesti.

La LKK-anoj strebis organizi agrablajn tagojn por la partoprenantoj. Tre riĉa estis la oferto pri turisma programo. Ni povis ekkoni ne nur la historion de Madrido, ĝiajn muzeojn, sed ankaŭ admiri ĝiajn ĉirkaŭaĵojn kaj belaĵojn dum tagaj aŭ noktaj promenoj.

Post la alveno sabate la 21-an de julio vespere okazis interkona frandvespero, kie ĉiuj alportis ion tipan por trinki aŭ manĝi el sia lando. Poste la ensemblo "Kaj Tiel Plu" animis la vesperon per siaj okcitanaj, sefardaj, trobaduraj kaj katalunaj kantoj, kelkaj el ili kantataj esperantlingve. Alian vesperon la duopo Ankie kaj Nanne el Nederlando ĝojigis la kongresanojn per koncerto kun siaj humuraj kaj etosoplenaj kantoj.

La ĉeftemo de la kongreso estis: "La kultura heredaĵo de Esperanto". Ĝi estis pritraktata en la enkonduka prelego de la prezidantino de ILEI Mireille Grosjean. La festprelegon "La eduka modelo de UNED" prezentis Manuel Pancorbo Castro.

La programeroj konsistis el prezentado de kelkaj libroj, oni diskutis pri la revuo de ILEI "Juna Amiko". Junuloj havis sian programon, ili amuziĝis ĉefe nokte. Okazis vizito al la Instituto de kultura heredaĵo, promeno tra la scenaro de la batalo de Madrido *¡NO PASARÁN!*

Dum la semajno okazis E-kursoj por komencantoj kaj progresantoj kaj ankaŭ intensa kurso pri la hispana lingvo. Irina Gonĉarova el Rusio parolis pri siaj spertoj kaj sukcesoj dum la baza E-kurso "Faru la Rondon". Yasuo Tabuchi parolis pri instruado kadre de Oomoto, Duncan Charters pri *Al Ándalus* - araba regado dum la mezepoko de la 711-a ĝis la 1492-a jaroj. Eblis babili kun Jorge Camacho pri verkado kaj tradukado en Esperanto. Miguel Gutieres Adúris prezentis la kvaran eldonon de sia vortaro "Amika".

Dum la Nacia vespero prezentiĝis la muzikistoj de la plektro-orkestro *Calle del Barguillo*, en kiu kantis la hispana poeto Miguel Fernández. Emocia estis prezento de flamenka danco. Ni ĝuis ankaŭ la spektaklon "Vivu la Teatro"! kun Miguel Fernández.

Dennis Keefe alproksimigis al ni sian revon pri Esperanto-plaĝo. De Lida Elbakjan ni eksciis pri armena kultura heredaĵo. Marija Jerkoviĉ parolis pri Esperantonimoj, Rob Moerbeek pri lingvaj esplorendaĵoj, Ana Manero prelegis pri avangarda artistino *Maruja Mallo*, Aŭrora Bute pri pioniro de modernismo en la skulptarto *Constantin Brâncusi*. Pri afrika kulturo kaj ties E-movado ni eksciis de Adjévi Adjé. Maritza kaj ŝia filino Ariadna prezentis la kuban kulturon en la E-movado. Ne mankis libroservo, estis instalita foto-ekspozicio pri kultura kroata heredaĵo kaj alia pri Esperanto. Ĝuinda estis aŭkcio lerte gvidata de José Antonio del Bario kaj Katalin Kovats.

Ĉe la fino estis prezentata la venonta kongres-lando Serbio kaj la urbo Ĉaĉak, kie ILEI kongresos de la 13-a ĝis la 20-a de julio 2019. Poste prezentiĝis nova estraro de ILEI kaj fine oni debatis pri kongresaj konkludoj kaj aliaj aktivaĵoj. Dum la Internacia adiaŭa vespero aktoris niaj talentuloj. Ni ĝuis kantojn, diversajn dancojn, poem-deklamadon, ŝercojn ktp.

Bone disvolviĝis AMO-seminario kaj E-Instruista Trejnado (EIT). Katalin Kovats disdonis diplomojn de KER-ekzamenoj al pluraj personoj. Tre sukcesa estis la Lingva festivalo, kie prezentiĝis trideko da lingvoj. La hispanoj invitis ĉiujn ĉeestantojn al sia venontjara kongreso, kiu okazos komence de majo en Malago kune kun la IFEF-kongreso.

Merkredo estis dediĉita al tuttagaj ekskursoj. Ĉi-foje estis elekto inter Toledo kaj Segovio. Ambaŭ proponoj estis allogaj kaj la partoprenintoj estis kontentaj post la reveno. Duontaga ekskurso celis la urbon Alcalá de Henares, kiu estis deklarita Monda kulturheredaĵo de UNESKO pro sia trajto de unua universitata urbo en la mondo.

Liba Gabalda

Kongreso de Esperanto-Asocio de Rumanio

(Gherla, 14.-16.9.2018)

Danke al kompleza invito de sinjorino Aurora Bute mi partoprenis en kongreso de Tutlanda Esperanto-Asocio de Rumanio (EAR) (*rumane:* Asociaţia de Esperanto din România, AER), kiu okazis en Gherla. La nomo de transilvania urbeto Gherla, 45 km nordoriente de Kluĵo (Cluj-Napoca), devenas el praslava vorto „grle“ („vadejo“). En mezepoko historio de la urbeto estis influita de armenoj, sed nun neniu armeno tie loĝas. Gherla havas proksimume 20 milojn da loĝantoj (79% da rumanoj, 17% da hungaroj, 4% da romaoj, germanoj k. a.).

Danke al laboristoj de Kultura kaj Eduka Centro, kie situis nia kongresejo, kaj oferema laboro de lokaj esperantistoj subgvide de sinjorino Mariana Berariu, ĉio estis bone aranĝita. Bela studenthejmo kaj bonega hungara kuirejo kontribuis al amika etoso de la kongreso. Partoprenantoj estis disciplinitaj kaj programo de la agado observita.

Sume renkontiĝis 29 partoprenantoj el Rumanio kaj po unu gasto el Nederlando, Italio kaj Ĉeĥa Respubliko.

Dum inaŭguro de la agado, en kiu ĉeestis Stefan MacGill, vicprezidanto de UEA, estis prezentita bona kunlaboro de rumanaj esperantistoj kun neesperantistoj. Aurora Bute, prezidantino de EAR, kaj Ielcean Radu, direktoro de la Liceo Ana Ipătescu en Gherla, publike subskribis interkonsenton pri partnereco de EAR kaj la Liceo.

Mi salutis la Kongreson nome de Esperanto-Muzeo en Svitavy, kies la 10-a datreveno okazis en la sama tempo kiel la Kongreso de EAR en Gherla. Vespere mi prelegis pri libeloj.

La Kongreso elektis novan estraron de EAR por trijara funkcia periodo: prezidantino estas Aurora Bute (Timiŝoaro), vicprezidanto Ionel Bodale (Suceava) kaj kasistino Petronela Birta (Timiŝoaro).

Dum duontaga ekskurso ni vizitis naturan rezervejon, la marĉon apud la vilaĝo Sic (hungare: Szék). Kaŭze de seka vetero la marĉo estis preskaŭ sen akvo. Alia surprizo atendis nin en la vilaĝo, kie loĝas 94% da hungaroj. La muzeo Domoj de Danco en Sic/Szék estas hungara folklora monumento. Ĉie sub tegmentoj pendis paroj de viraj kaj virinaj ŝuoj. Multe da ili estis tute eluzitaj per danco. Laŭkutime lokaj vilaĝanoj en la domoj de danco amuziĝis kaj trovis partnerojn por edzeco kaj komuna vivo.

Dum kleriga duontago prelegis ne nur spertaj esperantistoj Stefan MacGill (AMO, spronteamoj), Gabriella Stier (Esperanto-Poŝtkruciĝo), Mariana Berariu (Interesaj faktoj pri Rumanio), Aurora Bute (Esperantistaj kongresoj – fenestroj al la mondo) kaj Mihai Trifoi (Pri la rumana popola kulturo), sed ankaŭ rumana esperantista junularo, gelernantoj de Aurora Bute kaj Mariana Berariu. Doina Popa nin konatigis kun portugala muziko. Adriana Dolca rememorigis al la partoprenantoj grandan elstarulon de ru-

mana historio, la reĝon Karolo la 1-a (1839-1914), kiu estis koronata en la jaro 1881 kaj regis super Rumanio ĝis sia morto. Mihaela Dolca atentigis pri „La silenta malapero de flugantaj insektoj“. Cătălin Văduvă informis pri interreta Eo-kurso rumanlingve kaj la retpaĝaro de EAR. En fino de la Kongreso estis bela surprizo, teatro de unu aktorino, kiun kun granda talento esperantlingve ludis Petronela Birta.

La rumanaj esperantistoj interesiĝas pri esperantistaj agadoj en Ĉeĥa Respubliko kaj volas partopreni en soleno de la 50-a datreveno de renovigo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Brno.

Oldřich Arnošt Fischer
teksto kaj fotoj

La kongreson solene inaŭguris la prezidantino Aurora Bute.

Petronela Birta, kasistino, prezentas financan raporton kaj esperantlingve ludas teatron de unu aktorino.

Kurso de Esperanto (Mariana Pitar). Aurora Bute kun siaj lernantinoj Petronela Birta, Mihaela Dolca kaj Adriana Dolca.



Ionel Bodale, nova vicprezidanto de EAR.
D-ro Fischer, aŭtoro de la artikolo, prelegas pri libeloj.

Preĝejo apud fervoja stacidomo en Gherla.

Duontaga ekskurso en naturan reservejon, la marĉoj apud la vilaĝo Sic/Szék.

Jubileoj

Sinceran bondeziron al ĉiuj jubileuloj, sanon kaj kontenton!

Ing. Miloš Bloudek, Karlovy Vary
Danuše Gattermayerová, Kroměříž
Ing. Karel Hromek, Křižanov
Jaroslava Humpová, Trhové Sviny
Jaromír Kyzlink, Blansko
Ludvík Machát, Studenec
Mgr. Jana Melichárková, Vacenovice
Marie Minářová, Svitavy
Mgr. Anna Mrázová, Rokycany
Jaroslav Nový, Ústí nad Labem
Čestmír Petráš, Štramberk
František Skoumal, Bludov
Bohumila Trzosová, Brno
Marie Vrabcová, Jablonec nad Nisou
František Filip, Hradec Králové

Specialan saluton kaj bondeziron al František Janouš, 100JARA!!!

Marie Minářová (1938)

Laŭ profesio flegistino, esperantistiĝis en la jaro 1956 kaj en 1969 fariĝis unu el fondaj membroj de ĈEA. Multjara prezidantino de la klubo en Svitavy (de 1979 ĝis 2012). Gvidis lingvokursojn en la loka bazlernejo (ĝis 2014) kaj gvidas ilin nun en la klubo. Pri la muzeo ŝi okupiĝas pri la muzeaj gastoj kaj ĉiĉeronado tra la urbo.

Jana Melichárková (1958)

Instruistino, prezidantino de pedagogia komisiono kaj iama prezidantino de ĈEA (2005-2011), kiu inaŭguris nian muzeon antaŭ 10 jaroj. Aŭtorino de duvoluma Esperanto- lernolibro por infanoj.

KIO ĈAGRENAS MIN

UNUFRAZE :
MALGRANDA SCIADO PRI ESPERANTO EN ĈEĤA RESPUBLIKO

En lasta tempo mi sufiĉe ofte vizitadas multajn E-aranĝojn. Mi ĝojas pri agrabla atmosfero ĉe renkontado de E-konatoj, sukcesa paso de la aranĝo ktp. Por organizantoj (ordinare 1,2,3 personoj) ĝi estas peniga laboro - preparo, grandaj zorgoj, multe da tempo, nervoj …

La grandaj, notindaj aranĝoj estas PUBLIKIGITAJ, eĉ eksterlande, sed la lokaj, por nia Esperantujo same valoraj, preskaŭ NE.

Mi proponas – sciigu en Viaj montrofenestretoj, en regiona preso ktp. la informon pri Via Esperanto – agado. Prezentu Vin mem en bona lumo, laŭdu Vin mem! Portu mansaketojn kun E simboloj, sur la strato, en vagonaro, en tramo, en metroo babilu esperantlingve kun Viaj geamikoj… (kiu ideo ankoraŭ kaptas Vin por prezenti nian karan lingvon?) … = veku scivolon de la publiko, por ke ĝi demandu – KIO ESTAS TIU ESPERANTO?

Komence de septembro en interreto aperis diskuto ĉe artikolo https://eurozpravy.cz/magazin/233627-jazyk-se-kterym-se-domluvite-po-celem-svete-naucit-se-ho-lze-za-pouhe-tri-mesice/forum
Mi kontribuas en la diskuton sub nomo „adranoel“. Ĉu ankaŭ Vi sendos ian rimarkon, aŭ apogon por niaj Esperanto-argumentoj?

LChal

Kondolencoj

La 3-an de majo 2018 mortis s-ro **Antonín Bretšnajdr** (90-jara) el Skalice nad Svitavou

Sabate la 23-an de junio 2018 forpasis s-ino **Anna Pištorová** (84-jara) el Česká Třebová.

La 10-an de aŭgusto 2018 nin forlasis s-ino **Anna Veselá** (82-jara) el Brno (edzino de Adolf Veselý)

Dimanĉe la 26-an de aŭgusto 2018 mortis s-ino **Milada Vondroušková** (82-jara) el Brno (filino de Josef Vondroušek)

En Hradec Králové forpasis sinjoro **Miroslav Hromas** (1926-2018)

Ni rememoras

Josef Šilhart

(1876-1958)

Antaŭ 60 jaroj forpasis esperantisto-fervojisto Josef Šilhart, aŭtoro de libro **3300 bohem-Esperantaj fakaj frazoj por fervojistoj eĉ vojaĝantoj** (Nymburk 1923) kaj de lernolibro **Esperanto. Učte se cizím jazykům** (*Esperanto. Lernu fremdajn lingvojn*, Nymburk 1936). Plie li verkis ĉeĥlingvan kurson por rapida ellerno de la germana.

En siaj rememoroj li mencias epizodon, kiamaniere li fariĝis fervojista revizoro. La 28-an de oktobro 1918 estis proklamita Ĉeĥoslovakio kaj en tiu tago li kiel trajnestro kaptis vienan revizoron Šanda, kiu volis kontroli veturbiletojn de vojaĝantoj. Josef Šilhart atentigis lin, ke li vojaĝas en trajno de fremda ŝtato ne havante bileton, kaj postulis pagi pune tri guldenojn. Šanda plendis ĉe la praga trafik-ministerio, sed la ministro laŭdis s-ron Šilhart pro tiu ago kaj nomumis lin revizoro.

Foto montras la geedzojn Šilhart kaj la memortabulon sur ilia domo instalitan en 2005 fare de Esperanto-klubo Poděbrady.

Interesa artikolo pri J. Šilhart rilate al la jaro 1918 aperis en la septembra numero de la monatgazeto "Nymburský zpravodaj" sur la p. 11.

Theodor Kilian

(1894-1978)

En 1978 forpasis mezlerneja profesoro Theodor Kilian, aŭtoro de la plej sukcesa Esperanto-lernolibro en Ĉeĥio, tradukinto de *Blanka malsano* de Karel Čapek kaj ankaŭ parolisto de radio-elsendoj de Verda Stacio en Brno inter la militoj. Ĉi-somere estis trovita en lia heredaĵo dudeko da liaj prelegoj por la radio inter la jaroj 1932-1937. La prelegojn vi povas elŝuti en Pdf-formato: http://esperantobrno.cz/malnova/elsutu.html

La unua pri *Tutsokola kongreso* estis ankoraŭ kelkminuta la 16-an de aŭgusto 1932, sed la sekva *Amuza esperanta vespero* la 1-an de marto 1933 estis la unua tuthora artisma programo. En ĝi deklamis ankaŭ la 12-jara Ivan Blatný, posta granda poeto, poemon *Verda stelo* de Stanislav Schulhof.

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 22 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vr. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

06940 členství ČES
06941 členství UEA
06942 předplatné Starta bez členství
06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
06944 poplatek UK
06945 kongres EEU
50400 komise pedagogická ILEI
50401 písemný kurs začátečníci
50402 písemný kurs pokročilí
50404 Paroliga kurso
50405 svazové zkoušky
50800 sekce nevidomých LIBE
50900 sekce zdravotníků UMEA
51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
51200 sekce informatiky
70100 komise pro tisk a inf.
80200 ediční fond
80300 propagace v tisku
80400 fond Tilio
80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335.** Předplatné uhraďte na účet u **Equabank, č. ú. 101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1300,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 780,-Kč
La Gazeto: 550,- Kč, v.s. 07002, 6 čísel ročně, 32 stran formátu A5
La Ondo de Esperanto: nur reta versio 410,- Kč, v.s. 07003, 11 čísel ročně, 24 stran formátu A4
Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 3 čísla ročně, 50 stran formátu A5, reta versio 190 Kč
Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A 5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".)*

CIFERECIGITAJ GAZETOJ

Bonvenon en Muzeum.esperanto.cz en la suba parto de la biblioteka subpaĝo, kie troviĝas ligiloj al entute 13 senpage elŝuteblaj ciferecigitaj Esperanto-gazetoj, eldonitaj en 1902-1968 sur teritorio de la nuna Ĉeĥio. Aldonitas ankaŭ 4 nuntempe aperantaj *Starto*, *Praga Bulteno*, *Informilo de AEH* kaj *Dio benu.*

DIGITALIZOVANÉ ČASOPISY

V dolní části stránky knihovny na webu Muzeum.esperanto.cz lze využít bezplatný přístup ke 13 digitalizovaným časopisům, vycházejícím na území dnešní ČR v letech 1902-1968. Naleznete zde i odkazy na archívy v současnosti vycházejících periodik *Starto*, *Praga Bulteno*, *Informilo de AEH* a *Dio benu.*

Periodikum Českého esperantského svazu, z.s.
49. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku (bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:

p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, vratislav.hirs@esperanto.cz, tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 15.11.2018

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
49-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva numero: 15.11.2018

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO

2018-09-14/16 Dek jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy, Info: cea@esperanto.cz, Kalendaro de aranĝoj en Esperanto.cz
2018-09-27/29 Konferenco de fervojistoj en Železná Ruda, Hotel Ostrý
Info: AnnaAbelovska@seznam.cz
2018-10-12/14 Konferenco de ĈEA en Benešov
Info: leonarda.ch@seznam.cz
2018-12-01 Antaŭkristnaska Renkontiĝo en Písek (ANKRO), Info: pisek@esperanto.cz
2018-12-09 Marcipana Kristnasko en Svitavy
Info: svitavy@esperanto.cz
2018-12-29 Silvestro en Česká Třebová
Info: jk.esperanto@seznam.cz

Eksterlande

2018-10-05/07 Ĉelima Aŭtuna Renkontiĝo en Katowice http://ĉar.pej.pl/eo/

2018-10-18/21 KAEST en Modra (SK)
http://kaest2018.ikso.net/

2018-10-19/21 La 24-a Kongreso de Ukrainia Esperanto-Asocio en Lvov
Info: pacjurko@gmail.com
2018-11-16/18 Renkontiĝo GRUPE – 22 en Gliwice (proksime al Ostrava),
Info: stanislaw.mandrak@gmail.com
2018-12-08 Zamenhofa Festo en Vieno
Info: aef@esperanto.at
2018-12-28/2019-01-04 10-a Junulara E-Semajno en Storkow, http://jes.pej.pl
2019-01-03/07 La 37-a Poludnica en Liptovský Ján, Info: http://poludnica.esperanto.sk

PLI DA INFORMOJ ĈE
http://www.esperanto.cz/eo/akce
www.eventoj.hu/kalendaro.htm

Ĝoja preparas la ĝustan ĉinan teon en Svitavy

La urbestro de Vrdy Antonín Šindelář enkondukas la solenon omaĝe al F. V. Lorenc

Ĉeĥa karavano en Lisbono

Dek jaroj de Esperanto-Muzeo en Svitavy

Ekskurso el Svitavy al Moravská Třebová

Danko al klubaninoj de Svitavy

László Szilvási aprezas nian muzeon